

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La Jarkunveno okazigita

En la 18a de februaro, la Jarkunveno de Neprofitcela Organizo Esperanto-Jokohama havis lokon en sia oficejo, nome la Esperanto-Muzeo Jokohama. Tie efektive venis 15 membroj, kaj kun 6 perleteraj voĉoj kaj 9 voĉoj komisiitaj, ĉiuj proponoj estis unuanime aprobitaj: la jarraporto por 2023 kaj la agadplano por 2024, la kasraporto por 2023 kaj buĝeto por 2024, kaj aldono de s-ro Doi Hirokaz (denove) al la teamo de estraranoj.

Aŭstralia Radio 3ZZZ legis niajn artikolojn

(decembro 2023 - feb. 2024)

elsendo de la 18a de decembro 2023

el Novaĵoj Tamtamas numero 391 "Internacia romantika trompo" de Mizro Iwaya

elsendo de la 5a de februaro 2024

el Novaĵoj Tamtamas numero 392 "La fondinto de Duolingo montris pri la influo de AI al alilingva lernado" de Namba Fumiharu

Pola Retradio resumis niajn artikolojn (marto)

En la 5a de marto 2024, Pola Retradio resumis niajn 2 artikolojn, aperintajn en la numero 393 de Novaĵoj Tamtamas. Oni povas aŭskulti per jena jutubo:

<https://www.youtube.com/watch?v=t1zXWJ2uw3g>

sezonvorto marta

Kolza floro

Okita Kazumi

En printempo kolzo florigas hele flavajn florojn ĉe kampaj vojoj kaj riverbordoj. La kolzaj floroj, kiuj kovras kampon de la Duoninsulo Boso (en la gubernio Chiba) fariĝas unu el la popularaj turismaj vidindaĵoj en Japanio.

Onidire kolzo devenis de Ĉinio en antikva tempo, kaj komence estis kulturita kiel materialo de kolza oleo por lumigado. Oni komencis kulturigi manĝeblajn kolzojn en la erao Meiji (1868 ~ 1912), kaj lastatempe kolzo populariĝis kiel verdflava legomo, kiu havas altan nutrovaloron.



Japanaj Festotagoj (2)

Akiya Hideo

8. Tago de Verdo, la 4-a de majo

“Ĝuante la naturon, ni dankas ĝian benon kaj kreskigas nian koron emocioplena.” La tago ne devenas el difinita festo de antikva tempo aŭ historia evento. Ĝi nur celas plenigi feriojn de la 3-a (Tago de Konstitucio) ĝis la 5-a (Tago de Infanoj, sube).

9. Tago de Infanoj, la 5-a de majo

Laŭ la leĝo, “Respektante personecon de la infanoj, ni klopodas por feliĉigi ilin, kaj ankaŭ dankas al la patrinaj.” Kutime oni pensas ke la tago estas por knaboj. Por knabinoj ekzistas la festo de persiko, la 3-a de marto (tamen, ne nacia festotago.) Je mia surprizo, la leĝo zorgas ne nur pri infanoj, sed ankaŭ pri patrinaj. Nu, kia estas la pozicio de patrinaj? Ĉu la leĝdonantoj intencis ekvilibron inter viroj kaj virinoj?

10. Tago de Maro, la 15-a (la tria lundo) de julio

“Kun danko al la profito el la maro, ni esperas la prosperiĝon de la apudmara lando Japanio.” Onidire, ĉi tiun tagon en la jaro 1876 Meiĵi-tenno revenis al la haveno de Yokohama el sia krozado en la nord-orienta parto de Japanio. Tamen mi ne povas kompreni kial aŭ kiel tiu epizodo koncernis al popola vivo. Ĉu tio gravas? Ĉiuokaze la tago estis difinita al la tria lundo por kunigi ĝin kun la semajnfino eble por stimuli turismon.

11. Tago de Monto, la 11-a de aŭgusto

“Havante la ŝancon proksimiĝi al montoj, ni dankas la benon de la montoj.” Ŝajnas sensenca klarigo. Nenia specifa epizodo troviĝas. En aŭgusto, delonge oni havas ulambanajn feriojn kaj lernejoj estas en someraj ferioj tute dum la monato. Mi ne scias kial oni fondis ĉi tiun festotagon. Ĉu la tagon oni elpensis por fari paron kun la tago de maro en julio?

12. Tago de Estimo por Grandaĝuloj, la 16-a (la tria lundo) de septembro

“Ni estimas grandaĝulojn, kiuj longatempe pene klopodis por la socio, kaj ni gratulas ilian longan vivdaŭron.” Antaŭe tiu festo estis en la 15-a de septembro, sed same kiel kelkaj aliaj festotagoj, ĝi estis ŝanĝita al la tria lundo, ĉar

kunigi ĝin kun semajnfino oportunas por urbanoj viziti siajn maljunajn gepatrojn/geavojn.

13. Aŭtuna Ekvinoksa Tago, la 22-a de septembro

La festo por “respekti prapatrojn kaj rememori forpasintojn.” La dato estas astronomia ekvinokso kaj la mezdato de la ekvinoksa budhoserva semajno. Ankaŭ ĉi tiu aŭtuna ekvinoksa festo devenis el la kortega evento por kulti tennoajn prapatrojn.

14. Tago por Sano kaj Sporto, la 14-a (la dua lundo) de oktobro

“Ni ĝuas sporton, nutras respekton al aliuloj, kaj esperas realigon de la sana, vigla mondo.” Origine la tago estis el la malfermo de la unuaj Tokiaj Olimpikoj, la 10-a de oktobro, 1964.

15. Tago de Kulturo, la 3-a de novembro

“Ni amas liberecon kaj pacon, kaj progresigas nian kulturon.” Oni ankaŭ memoras ke ĝi estas la tago de la proklamo de la Konstitucio de Japanio. Verdire, ties origino estis la naskiĝtago de Meiĵi-tennoo (1852-1912).

16. Festo por Danko al Laboro, la 23-a de novembro

La tago estas por festi rikolton de la jaro. En la leĝo, “Ni respektas laboradon, festas produktadojn, kaj dankas nin reciproke.” Antaŭ la dua mondomilito ĝi estis nomata “Niiname-sai (festo de nova rikolto)”, kiu estas la evento de la tennoa familio.

Kiel ni vidis, 8 el 16 festotagoj origine ligiĝas al aferoj pri tennooj. Do, ni povus diri, ke la naciaj festotagoj ne ĉiam estas por la popolo. Sed, tamen, ĉiuj nepre bonvenigas libertagon publike garantiitan sendepende de ties deveno, ĉu ne?

La leĝo pri naciaj festotagoj aldone diras; kiam iu festotago koincidas kun dimanĉo, la plej proksima posta tago, ne festotago, estu ferio. Kaj iu tago, kiu ne estas festotago kaj kuŝas inter du festotagoj, estu ferio.

Ankaŭ tiuj du reguloj certe plaĉas al multaj dungitoj. (fino)

eseo

Mi kaj fabeloj

Itabaŝi Micuko

Mi havas dikan libron de fabeloj. Ĝi estis eldonita kiel la dekseca volumo de fabelaro de la mondo preskaŭ antaŭ cent jaroj. Tuj antaŭ kaj post la dua mondomilito ni estis malriĉaj kiel ordinaraj japanoj. Aĉetebraj libroj mankis por ni. Ĉiunokte gepatroj fabelis al ni rakontojn kaj historiojn japanajn kaj mondajn. La fabelarolibro havis pli ol okcent paĝojn kaj ni libere povis legi ĝin. Ni gefratoj amis la libron kaj kreskis kun tiuj fabeloj. Ĉiuj el ni volis proprigi ĝin al si. Post forpaso de nia patro mi kaj juna frato serĉis ĝin, sed ne povis trovi ĝin. De tiam pasis longe. Antaŭ kvar jaroj, tuj post forpaso de mia plej aĝa fratino mi ricevis la libron de mia nevo kun slipo skribita 'sendu al Micuko. Sed ĝi jam estis ĉifona kaj mankis kelkaj paĝoj.

La libro konsistas el tri partoj japana, korea kaj ajnua. Kial koreaj fabeloj estas en ĝi? Certe vi scias, ke Japanio koloniis Koreion en la jaro 1910. Tial oni enmetis koreajn fabelojn en ĝi.

Kiam mi prenis la ĉifonitan libron en la manoj, mi estis malĝoja, pensante, ke povos esti, ke la fabeloj amataj de mi malaperos.


En 1991 mi partoprenis en bergena kongreso. Post la kongreso mi vojaĝis en Norvegio kaj Svedio. Tiam mi gastigis en hejmo de s-ro Olav Bjørnsud, kiu loĝis en urbo Kongsbergo. Tiutempe mi laboris en protekta instalaĵo de handikapuloj. En Japanio oni nomis ĝin laborejo sed en Norvegio kaj Svedio ĝi estis nomita tagohejmo. Historio de tiuj instalaĵo en nia lando estis tute mallonga. Kaj mi volis scii, kiel oni administris ĝin en tiuj landoj, kaj vizitis tiujn landojn. Tiam Olav donacis maldikan fabelaron 'NORVEGAJ POPOLFABELOJ' al mi.

Lastatempe mi relegis ĝin. En ĝi estas rakonto 'La tri virkaproj kurbkornuloj, kiuj iris al setro (? stepo aŭ herbejo?!)' por paŝti sin esti grasaj. Mi rimarkis, ke ĝi estas origina rakonto de bildolibro nomata 'Tri kapro Gara-gara-don (aŭ *sanbiki no jagi no Garagaradon*). La bildolibro allogis japanajn infanojn en longa tempo. Ĝia

intrigo estas tute simpla, sed tamen la rakonto altiradis infanan koron.

Laŭ mia opinio, la fabeloj estas ne tiel kompleksaj, vivadis longe en sia nacio kaj transdonadis la saĝon al nova generacio. Ili estas trezoroj de la nacio. Se ni perdos ilin, ni perdos naciajn trezorojn. Mi tre bedaŭros, ke niaj fabeloj malaperos de nia mondo.

Fine, mi volas iom rakonti pri Olav. Tiutempe li jam estis en la sepdekaj jaroj. Antaŭ la dua mondomilito li kelkfoje sendis siajn poemojn al japana gazeto 'La Revuo Orienta'. Ĉiufoje s-ro Osaka resendis ĝin kun sia sincera opinio. En iu jaro (eble en 1939) li ricevis la gazeton kun letero de Osaka. En la gazeto estis lia poemo. Kaj Osaka pardonpetis lin, ke li ne konsentite korektis unu version de lia poemo. Olav estis tute kortuŝita. Kaj li diris, ke Osaka estis elstara kaj respektinda gvidanto en nia mondo.



Prelego

Esperanto-Muzeo Jokohama (2)

Doi Hirokaz

La loko

La Muzeo troviĝas proksime de la stacidomo Idogaja en fervojlinio de *Keihin-Kjuukoo*. Al Idogaja de la flughaveno de Haneda oni bezonas ĉirkaŭ 40 minutojn per ekspreso sen transvagoniĝo. De la stacidomo de Tokio al Idogaja oni bezonas ĉirkaŭ 50 minutojn.


La muzeo situas proksimume 500 metrojn de la stacio kaj proksimume 8 minutojn piede.

Skalo kaj superrigardo de la muzeo

La muzeo havas terenon de 103 kvadratmetroj, kaj la konstruaĵo estas duetaĝa privata domo kun totalo de 106,8 kvadratmetroj.

Oni utiligas kvar ĉambrojn por ekspoziciejo. En ambaŭ etaĝoj estas po 2 ekspoziciejoj.

Ni karesnomis ĉiun ĉambron; en la unua etaĝo la ĉambroj de Ludoviko Zamenhof kaj Klara Zamenhof. Kiam oni uzas kune ambaŭ ĉambrojn karesnomo fariĝas simple Ĉambro Zamenhof. La 2-a etaĝo konsistas el la ĉambroj de Privat kaj Hodler. Krom ili ekzistas Zofia Zamenhof por kuirejo, Adam Zamenhof por provizejo en la unua etaĝo, kaj Lidia Zamenhof por tenejo de ĉefe gazetoj, la lasta estas Hans Jakob por oficejo kaj tenejo de duoblaj libroj, en la dua etaĝo.



Ekspoziciaĵoj

La ekspoziciaĵoj konsistas el klarigaj paneloj, libraro, gazetaro kaj aliaj objektoj koncernantaj Esperanton. La libroj kaj periodaĵoj estas ne speciale sed ĝenerale kolektitaj. Estas ĉirkaŭ 5 600 libroj kaj ĉirkaŭ 13 500 periodaĵoj. Aliaj dokumentoj kaj objektoj estas ĉirkaŭ 1 500. La lastaj estas el korespondaĵoj, kongresaj memorsakoj de Universalaj kaj aliaj kongresoj, insignoj de Esperanto, poŝtmarkoj, memorglasoj de renkontiĝoj k.t.p. Ĉi tiuj eroj estas donacitaj de pli ol 50 homoj.

Inter la donacintoj, estas emerita profesoro Gotoo Hitosi. Li estas unu el la kompilintoj de “Biografia Leksikono de la Esperanto-Movado en Japanio”. Ĉiu artikolo de la leksikono havas citaĵon de literaturo pri la persono. La citita origina libro estas grandega. Multajn el la materialoj Gotoo donacis al ni. La kvanto estas pli ol 5 500. Ni ordigis ilin laŭ japana alfabeto ordo laŭ nomo de esperantistoj. Tiu ĉi parto estas grava en la muzeo.

La filo de Ooŝima Joŝio donacis al ni ĉirkaŭ 2 mil heredaĵojn de sia patro. Oni konas lin ankaŭ sub la pseŭdonomo Takagi Hiroŝi. Li mem verkis multe da artikoloj en diversaj gazetoj aŭ li verkis, kompilis kaj eldonis lernolibrojn de Esperanto, nome “Esperanto en kvar semajnoj” en 1961, tri-voluman “Nova Kurso de Esperanto” en 1968, ktp. kaj ankaŭ Esperanto-periodaĵojn, nome, “Kamarado” en 1928, “Studo pri Internacia Lingvo” dum 1933 ĝis 1936, “Esperanta literaturo” dum 1933 ĝis 1934, “Nova Fronto” ĉirkaŭ 1948, “Nova Rondo” de 1966 ĝis 1976 ktp.

Estis donacoj de la familianoj de Koyama Takesi, Hirose Kanae, Macuda Jutaka en Jokohamo, Sugijama Haĵime en Odaŭara, Jazaki Jouko en Hukuŝima kaj Jagi Hideo, Harada Hideki en Okajama, ktp. Ankaŭ al nia muzeo estis donaco de nun vivantaj; de Tanaka Joŝikacu en Tokio, Hori Jasuo en Gunma, Takagi Miĉiko en Nagojo. Precipe s-ino Takagi en la frua tempo donacis al ni preskaŭ 1 500 librojn kaj periodaĵojn.

(daŭrigota)